Theodor Storm,

La urbo (2a versio)

tradukita de Manfredo Ratislavo

Ĉe l' griza strand', ĉe l' griza mar'
Situas la urbet';
Nebulas sur la tegmentar',
La monotona bru de l' mar'
Aŭdiĝas tra l' kviet'.

Arbar' ne estas tie ĉi,
Ne kantas bird' sen ĉes';
Anseroj nur, kun dura kri',
Forflugas alte preter ĝi,
Ĉe l' strando flirtas gres'.

Sed pendas mia kor' de vi,
Vi griza urb' ĉe l' mar';
De la juneco sorĉ-graci'
Ridante kuŝas super vi,
Vi griza urb' ĉe l' mar'.

Traduko de la Germana poemo "Die Stadt" de Theodor Storm *(Teodoro Stormo, ∗1817-09-14 – †1888-07-04) en Esperanton de* Manfredo Ratislavo *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04).*

Arg-173-348 (2004-02-22 14:30:28)